

La SAGO

La Sat-Amikara Gazeto

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*



.....
WIKIPEDIA
10

Vikipedio 10-jaraĝas! Plu kreskas la vikipedio en Esperanto

*Tiuokaze,
SAT-Amikaro sendos
subtenĉekon je 100 € al
Wikimedia France
por subteni
la vikipedian movadon.*




Foto: Wikipedia, Ziko

Nur tri tagojn post la 10-jara jubileo de la entuta vikipedio-projekto - en la 15-a de januaro - la Esperanto-vikipedio atingis 140.000 artikolojn, nome vespere de la 18-a de januaro. Nuntempe «nia» versio de la vaste konata internacia projekto enhavas pli ol 30 milionojn da vortoj - simile granda kiel multvolumaj paperaj enciklopedioj. Ĝi aktuale okupas laŭ la nombro de artikoloj lokon 26 kompare kun alilingvaj versioj de la reta vikipedio. Antaŭ la tempo de interreto kaj rapida internacia kunlaboro oni simple ne povis revii en Esperantujo pri tia projekto - tiel granda kaj tiel rapida: <http://eo.wikipedia.org>

Pli ol 300.000 rigardoj tage

Ĉiuhore estas proksimume 15.000 rigardoj al paĝo de la Esperanto-vikipedio; per tio Esperanto okupas lokon 38 en komparo kun aliaj lingvoj.

WikiTrans: Automata vikipedio-traduko kun 2,6 milionoj da artikoloj

Multe pli granda ol la Esperanto-vikipedio estas la aŭtomata traduko de la angla vikipedio en Esperanton, kiun preparis la dana entrepreno *GrammarSoft* gvidata de Eckhard Bick. Ĉe <http://epo.wikitrans.net/> eblas serĉi en pli ol 2,6 milionoj da artikoloj maŝine tradukitaj - kun nivelo certe

ne jam perfekta, sed kun kutime bone komprenebla enhavo.

Ĉu vi ŝatus kunlabori en vikipedio?

La artikoloj de WikiTrans taŭgas ankaŭ kiel bazo por kreado de artikoloj en la aktuala vikipedio, se oni volas ĉerpi almenaŭ parton de la enhavo el la angla vikipedio. Se vi volas kunlabori en la granda libera Esperanto-enciklopedio - jen eble bona komenco. Pliaj informoj troviĝas sur la bonveniga paĝo http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Bonvenon_al_la_Vikipedio.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

Legindaj Legendoj Venkas Davido.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj.

Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

La du armeoj tendumis, ĉiu sur unu flanko de la monto, sin preparante por la batalo. La teruraj Filiŝtoj frontis la malfortajn Izraelidojn, inter ili kuŝis la valo.

Giganta ĉiampiono eliris el la Filiŝta tendejo. Li nomiĝis Goljato. Li portis kirasojn kaj kaskon el kupro kaj pezan kupran ŝildon. La pinto de lia lanco estis plejmoderne el fero. Li forte alparolis la Izraelidojn¹: « Elektu viron por lukti kontraŭ mi. Li venu al mi por dueli. Se li estas sufiĉe fortika kaj venkos min, ni ĉiuj estos viaj sklavoj ». Pro la impresa aspekto de la malamiko, la Izraelidoj timis. Goljato tiel revenis plurfoje por instigi la Izraelidojn al batalo.

En sia distanca bieno, Jiŝajo ordonis al sia plej juna filo, ŝafgardisto, porti nutraĵojn al la pli aĝaj fratoj, en la militistan tendejon.

Davido obee leviĝis² frumatene, lasis sian ŝafaron sur la herbejo al iu gardisto. Li alvenis en la tendaro, informiĝis pri la farto de siaj du fratoj, kiam la militistoj aranĝis sin por la batalo.



Osmar Schindler (1869-1927)
David und Goliath, 1888

Goljato denove revenis kaj defuis la Izraelidojn. Li diris: al tiu, kiu venkobatos tiun gigantan viron, la reĝo donacos grandan riĉecon. Davido aŭdinte la provokon kaj promeson, proponis sin por lukti kontraŭ Goliaton. Neniu kredis, ke li povos venki Goljaton kaj oni trovis lin aroganta. Davido argumentis, ke li ja kapablas timigi la ursojn por protekti siajn ŝafinojn.

La reĝo Saŭlo vestis Davidon per siaj vestoj, donis al li kuprajn kirasojn kaj kirasojn kaj pezan glavon³. Tiel ekipita, Davido provis iri, ne povis ĉar li ne kutimis. Li diris al Saŭlo: «Mi ne estas soldato,

mi ne kapablas marŝi sub tioma pezo.» Li demetis la pezajn armilojn, prenis nur sian bastonon, metis kvin ŝtonojn el la torento en sian sakon kaj kun sia ŝtonĵetilo⁴ en la mano, iris al Goljato. Vidante tiun sveltan kaj maldikan vireton, Goljato malestime⁵ diris: « Venu al mi, mi faros de vi kaĉon por la bestoj. » Tiam, Davido trankvile prenis ŝtonon el la sako kaj per la ŝtonĵetilo, trafis la timigan giganton. La ŝtono frakase penetris en la frunton. La animo vaporiĝis tra la truo kaj Goljato falis kun vizaĝo al la tero.

Teknologio helpas al la malfortuloj.

Klod

Notoj:

1	Izraelido	antikva Israelano
2	Li ne disponis pri lito	
3	Glavo	mallonga peza spado
4	Ilo por ĵeti ŝtonojn foren	
5	Kun malalta opinio pri Davido	

Kvinpetalo, Bureso

Epifaniante la unuan de Januaro, ĉu la staĝantoj volis komprenigi ke pli gravas anticipi la eventojn ol tro fidele respekti la tradicion?



Esperantistoj aktivas

San-Briego (22 Saint-Brieuc)



Ĝoje ni lernis Esperanton

La 11-an kaj 12-an de decembro 2010 Esperanto 22 organizis staĝon en la junulargastejo de San-Briego. Je la 14-a ĉirkaŭ 35 partoprenantoj, ĉefe el Bretonio, estis pretaj por ĝoje studi esperanton.

Estis tri nivelgrupoj: la komencantojn instruis Petra Smideliuz (juna hungarino), la progresantojn instruis Jean-Luc Kristos, pri la babilantoj zorgis Serge Sire.

Ni mem, ĵurnalistoj de la Verda Triskelo, lernis en la duanivelan grupon. Dank' al la pedagogio de nia instruisto Jean-Luc, ni multe parolis esperanton per ludoj, kantoj, krucenigmoj. Plie, ni multe ridis kaj ĝojis, kvankam en nia grupo estis iom tro da partoprenantoj, ĉirkaŭ 20.

Sabatvespere, post la kuna manĝo, ni aŭskultis Jean-Luc ludi elektran pianon kaj kanti. Ankaŭ ni kantis, kaj poste kelkaj dancis bretonajn dancojn dum Stéphane ludis fluton.

Dimanĉe, ni denove lernis ludante, kantante kaj kompreneble ridante.

Dum la staĝo, ni ankaŭ povis konsulti la libroservon, kaj aĉeti librojn (ekzemple «Paĉjo, kio estas rasismo?» el Tahar Ben Jelloun) kaj vortarojn.

Ni vere intencas partopreni la venontan staĝon je la 26a kaj 27a de marto: bonvolu, venu kun ni lerni ludante, ridante.

Alain, François, Marylène, Marie-Pierre kaj nia instruisto Laurent

DUA ESPERANTA SEMAJNFINO

26-a (14h) ĝis la 27-a (17h) de marto 2011

Auberge de jeunesse de St Brieuc (alirebla por handicapitoj)
Manoir de la Ville Guyomard, Les Villages 22000 - Saint Brieuc

Profitu la okazon viziti belan regionon; printempe vere agrablas laŭiri marbordon babilante esperanton.

Intervenantoj:

Marek BLAHUS (Ĉeĥio) 1a nivelo

Renée TRIOLLE 2a nivelo

Christian RIVIERE 3a nivelo

Pliaj informoj:

Esperanto 22 Armor

Franjo LEVEQUE 3, rue Voltaire 22000 - ST BRIEUC

09 53 92 77 37 leveque.franjo@gmail.com

Perkoresponda instruado

La seminario projektita kaj anoncita en La Sago 70 fine okazis en Kvinpetalo⁽¹⁾ (86 Bureso) de la 2010/12/29 ĝis la 2011/01/02 kaj arigis sep partoprenantojn.

En la unua kunsido, ni starigis ĝeneralan skemon de ĉio necesa por iu, se ne ideala, almenaŭ sufiĉe kontentiga servo pri perkoresponda instruado. Sekvis analizo de ĉiuj eroj: ĉu ekzistas (kontentiga aŭ plibonigenda) ĉu ne ekzistas (kreenda aŭ nur kreinda).

Tuj evidentiĝis ke ni ne ĉion povos fari - sed pri tio ni ĉiuj konsciis jam antaŭ la alveno - kaj do ni preterlasis, interalie, ĉion rilatan al perretaj kursoj, kvankam ni bone konscias ke necesas kaj plibonigi tion kio jam ekzistas, kaj krei tion kio mankas, ĉefe pri la niveloj post la unuagrada. Tia servo postulas fakulojn, kiaj ni ne estas, kaj multe pli da tempo ol ni disponis en nia staĝo.

Ni decidis koncentriĝi pri du punktoj, unue la rolo de la kunordiganto, kaj due, la kursmaterialo por la duagrada kurso.

La kunordiganto.

Post la klarigoj de Klod' pri la taskoj kiujn li plenigis ĝis nun, klare aperis ke fakte li surmetis du kaskedojn, nome, tiun de kunordiganto kaj tiun de korektanto, tio iel klarigas ke li demisiis pro troa laboro.

Ni difinis kio estas specife la tasko de la kunordiganto, nome:

- 1) teni liston de la korektantoj
- 2) teni liston de la lernantoj
- 3) rilatigi ilin
- 4) sekvi la evoluon de la kursoj, ĉefe ricevi bilancon
- 5) rilati kun la libroservo kaj la kasisto

Ĉe la punkto 3 riveliĝis grava misfunkciado, ĉar la rilatigo okazas iom hazarde, pro manko da kono kaj de la korektantoj kaj de la lernantoj.

Ni do decidis redakti du demandarojn, la unuan por la korektantoj, la alian por la lernantoj, por pli bone scii kiunivele ili deziras labori, kun kia metodo, laŭ kiu ritmo, ktp, tiel ke oni pli kongrue rilatigu lernantojn kun korektantoj. Ni ankaŭ decidis ke la kunordiganto, prefere ne estu samtempe korektanto, tiel evitante ke ĝi sin tro ŝarĝas kiam ĝi ne scias al kiu transdoni novan lernanton, kaj ankaŭ por ke la tasko estu sufiĉe ne peza, tiel ke ĝi povas instigi iun transpreni ĝin. Provizore, mi transprenas la taskon, almenaŭ dum la periodo necesa por enkonduki la sistemon per demandaroj priskribitaj ĉi supre, sed ja necesos trovi alian kunordiganton: La Sago estas per si mem sufiĉe tempovora! Do, jam se iu

sentas emon por tiu ne tre peza tasko, tiu sin anoncu!

Duagrada kursmaterialo.

La libro «*Por la praktikantoj*» de Pierre Babin estas taksata de Klod' bona ilo por tiu nivelo, kaj ankaŭ ŝatata de lernantoj kaj korektantoj. Tamen nun ĝi prezentas du malavantaĝojn, unue ĝi iĝas iom eksmoda, due - kaj ĉefe! - ĝi ne reeldoniĝas...

Ni decidis revivigi ĝin - kun la plena konsento kaj kontento de P. Babin - sub formo de memstaraj slipoj (4 A4-paĝaj), redaktitaj laŭ fiksa ŝablono, kiun ni difinis.

La ŝablono sekvas pli-malpli tiun de la jam ekzistanta Babinaĵo, la ĉefaj diferencoj estas:

* malaperigo de la desegna paĝo (kiu celis paroligi la lernantojn, do ne kongruas por perkoresponda kurso).

* anstataŭigo de la unua teksto per bildo kun teksto (humuraĵo, bildrakonto, k.s.) por diversigi la formojn; la klarigoj kaj demandoj rilatos kaj al tiu bildo kaj al la eltiraĵo de literatura verko.

* aldono de unu tasko, laŭplaĉe, redaktado aŭ traduko.

La principo resumiĝas tiel: la kurso konsistas el fiksa nombro (ekz. 15) da slipoj, elektitaj laŭ difinita progres-programo, sed ankaŭ laŭ la temoj, aŭ laŭ specifaj bezonoj, depende de la petoj de la lernanto. Tio supozas grandan stokon da slipoj (celo por la jaro 2011: 40 slipoj: 20 adaptitaj de la libro + 20 novaj).

Tiu laboro nepre estu skipa laboro; se multaj homoj partoprenas en ĝi, ne estos individue multo por fari, kaj estas diversaj manieroj kunlabori:

* ĉu engaĝiĝi por redakti eĉ nur unu slipon,

* ĉu nur kolekti tekstojn aŭ bildojn,

* ĉu nur el tekstoj/desegnoj redakti la necesajn klarigojn aŭ la demandaron,

* ĉu nur proponi temojn por redaktado aŭ tekstojn por tradukado.

La skipo jam konsistas el la partoprenantoj de la seminario, kaj ĉiuj volontuloj estas bonvenaj, eĉ por tute eta kontribuo.

Por ĉiaj reagoj, skribu al La Sago, ĉu rete (lasago@free.fr) ĉu poŝte (La Sago ĉe Serge Sire 85 imp. des Fées 74330 Sillingy)

Serĝo

(1) Eksterteme, la staĝo spertis tre malvarman buresan kuntekston. Ja pri la vetero, oni malfacile povas kulpigi iun...

Enhavo

- 1 [Kovrilpaĝo](#) Vikipedio dek-jaraĝas!
 - 2 [Legendaj legendoj](#)
[Esperantistoj aktivas](#)
 - 3 Perkoresponda instruado.
 - 4 [HuMorelaj Linioj](#)
Selle-Humuraĵo
 - 4-5 [Atesto pri la eventoj sur Placo Bellecour...](#)
 - 5 [El nia leterkesto](#)
Selle-Humuraĵo
 - 6 [E-kuiru!](#)
Pli etikaj bankoj
Selle-Humuraĵo
- ### Supplément en français
- 7 [Il s'en est fallu de peu](#)
 - 8 [L'espéranto au Bac](#)
 - 9 [Espéranto Ariège.](#)
 - 10 [L'espéranto, comment ça marche ?](#)
 - 11 [Praktikaj informoj](#)
 - 11.12 [Kiel esperantigi proprajn nomojn](#)
 - 12 [Libro-servo](#)
 - 13 [Libroj vivas pli longe](#)
 - 14 [Alvoko al kandidatiĝoj](#)
Kotizo, fisk-atestoj kaj abonoj
Dua projekto de Interkant'
 - 14.15 [Seta kongreso](#)
 - 16 [Esperantistoj aktivas](#)
Ĉe la lago 72

Reagu!

Pri la franclingva suplemento

* Ĉu vere utila ?

* Kiel vi uzas ĝin ?

Ĝi aperas kolore, jam de la pasinta numero.

* Kion vi opinias pri tio ?

Malfruo...

Vi ja ricevis LaSagon71 kun iom da malfruo... Fakte, nia presisto donis al si vintran ferion (skandale, ĉu ne ?), kaj ne avertis nin (ja pli skandale, ĉu ne ?)...

Ankaŭmankislareferendumilopri Greziljono... Ni ree klopodis, ke ĝi estu kun tiu ĉi !

Estu vi indulgemaj !

Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Klod	Franjo	Leveque
Ĝenovevo (Beziero)	Lino	Ljo
Alain (Esp. 22)	Lino	Markovo
François (Esp. 22)	Guy	Martin
Marylene (Esp. 22)	Lin'	Morel
Marie-Pierre (Esp. 22)	Yves	Nicolas
Laurent (Esp. 22)	Frédéric	Scibor
Andreo Andrio	Jean	Selle
Jorgos Comte	Serĝo	Sir'
Izabelo J.	Lu	Wunsch-
JoLo Ko		Rolchoven
Ĵak Le Puil		

L'Association Espéranto-Limogois vous invite
Pour la soirée
Aux Tables Céladon

APÉRITIF CULTUREL

CONCERT JAZZ MANOUCHE
Le 15/12 de 17h30 à 19h

Avec le groupe
Les PAPAGOI

Logo: Django Reinhardt

Ligi *Django Reinhardt* kaj L.L. Zamenhofon estas veto kiun aŭdacis Pjer Buvje, la 15an de decembro 2010 en «*Matins Celadon*», literatura kafejo de Limoĝo, por festi nian esperantan datrevenon kaj konigi nian internacian lingvon tra cigana koncerto kun la grupo «Papagoj» kaj tra la artikolo de *Miyoshi Etsuo* en «*Le Monde*» kiu alvenis sufiĉe frue!

Izabelo J.



Esperantistoj aktivas
Limoĝo (86 Limoges)

ĉe la lago

far Sir'

kroniko pri la ĉiutaga vivo en Anci'

Epizodo 72

Driiing !

Saluton !
Mi estas la loka peranto de SAT-Amikaro !...

do mi venas viziti vin...

Jen...

Mi ricevis vian adreson..

Ĉu mi povas vidi vian patrinon ?

Mian patrinon ĉu vere ?

mmm...

Ĉu vi scias ludi ŝakojn ?

?!?